Vi devas scii ke li estis la centro de granda "vulpo kaj ansero" ludo kaj ĉiun tagmezón kaj ĉiun vesperon la ĉirkaŭ loĝantaj infanoj venadis kaj ĉirkaŭludadis lin, kaj sentigis lin komforta kaj valora.

Tiam, iafoje oni ludadis kaŝludon, kaj li estis la ĉefstacio.

Tia amuzajo estis, kiam la geknaboj ekkuras al li, kaj ekbatas lin sur la ŝultron, kaj ekkrias: "Unu! du! tri! jen por mi!" ĝuste kvazaŭ li estas reala, vera persono.

"Mi intencas resti ĉi tie por ĉiam" la neghomo, deklaris al si mem; "estas tute sensencaĵo kiam la negeroj fluidiĝas, kaj ŝanĝiĝas, kaj ĉirkaŭflugas. Mi jam lernis kion mi ŝatas fari, kaj mi intencas esti por ĉiam neghomo."

Nu, estis tre bone ke la neghomo projektu, ĉar, kompreneble, la neghomoj ne povas scii tre multe pri tiaj aferoj. Se li estus estinta tre saĝa, li estus sciinta ke nenio sur la tero restas ĉiam la sama.

Sed li ne pretendis esti saĝa—li estis nur negho.

Granda pino apude aŭdis la neghomon parolanta, kaj interne subridadis al si mem:

"Li opinias ke li daŭros por ĉiam!" ridis la pino. "Eble mi diros al li ke li estos bonsanca se li daŭros tri tagojn."

"Ne, pripensinte pri ĝi, mi ne informos lin," la arbo decidis je dua penso, "ĉar li ne suferos tiom, se li simple lernos ĝin per si mem."

(Fakto, kiu pruvas ke la arboj kelkfoje estas pli saĝaj ol la homoj.)

Tial, la neghomo vivis tri feliĉajn tagojn. La kvara mateno tagiĝis varma kaj suplena.

Je tagmezo le tegmentoj kaj la arboj gutetigis negaĵon kaj akvon, kaj la kortoj estis molajemaj kaj molaj.

"Tio ĉi estas iomete laciĝema," konsentis la neghomo; "simple stari ĉi tie ne estas tiom da amuzado kiom mi supozis."

And he sagged a bit to one side.

As night time came the air grew cooler. The snow man, refreshed by the cold wind, tried to straighten up and be as important as before.

But he couldn't move!

Something was wrong with his left side and he couldn't stand up straight and tall any more.

"Oh, I'm so ashamed," he groaned, "I wish I could hide! I don't want the children to ever see me so lop-sided and crooked."

Some kind little snowflakes heard him talking and felt sorry for him.

"Come on, let's cover him up," they said.

So all through the night they fell upon him, wrapping his crookedness in their soft embrace.

When morning dawned, the snow man was gone. Only a soft heap of fresh snow marked the place where he stood.

"Oh, well," said the pine tree (who was very used to life), "now the children can have the fun of making another snow man!"

Boston "Record"

Kaj li klinetiĝis iom flanken.

Kiam la noktatempe alproksimiĝis, la aero malvarmetiĝis. La neĝhomo, refresigita per la malvarma vento, provis rektiĝi sin, kaj estis tiel valora kiel antaŭe.

Sed li ne povis movi!

Io estis difektita en lia maldekstra flanko, kaj li ne plu povis stari rekte kaj alta.

"Ho, mi tiel hontas," li ĝemis, "Mi deziras kaŝi min. Mi ne volas ke la infanoj iam vidu min tiel klinema flanken kaj malrekta."

Kelkaj bonkoraj neĝeretoj aŭdis lin parolanta, kaj kompatis lin.

"Venu! Ni elkovru lin!" ili diris.

Pro tio, dum la tuta nokto ili falis sur lin, ĉirkaŭvolvante lian malrektecon en sia mola ĉirkaŭprenon.

Kiam la mateno tagiĝis, la neĝhomo forestis. Nur mola amaso da neĝo signis la lokon kie li staris.

"Ho, nu," diris la pino (kiu estis tre kutimita al la vivado), "nun la infanoj povas havi la amuzajon fari alian neĝhomon."

Tradukis, Dr-o D. O. S. Lowell,
En la Boston Esperanta Societo.

LA TAGTEMPO DE LA BELGA STANDARDO

Estas necese ke tiu tago, kiam nia standardo estas tremetonta kiel simbolo de ameno kaj de dankemo en ĉiuj francaj manoj, estu tago de espero kaj gloro por la tuta Belgujo.

Ni forgesu momente nian teruran mizeregon, niajn kamparojn la plej belajn, la plej produktemajn el Eŭropo tiom difektitajn ke ĉiokion oni diras pri tio, ne povas imagigi rabodezertigon kiu ŝajnas neriĝebla. Ni forgesu, se eble, la virinojn, la geinfanojn, la gemaljunulojn, la senkulpulojn, la pacifistojn mortigitajn milope, kies la kalkulo miregos la mondon, kiam estos rompita la terurega barilo malantaŭ kiu okaziĝas tiom da kaŝataj abomenaĵoj. Ni forgesu tiujn kiuj mortas pro malsato en nia lando sen rikoltoj, sen domoj, metode perforte devigata pagi, elrabadata kaj premagata ĝis la lasta guto de l'vivo. Ni forgesu la lastan parton de nia popolo dispelitan tra la vojoj de l'ekzilo, vivantan per la publika bonkoreco kiu, tiom frata, tiom amena ke ĝi vidigu sin estas tamen tiom peza al manoj inter ĉiuj laboremaj, kiuj neniam konis la pezon de l'almazo. Ni fine forgesu niajn lastajn urbojn minacatajn, la plej belajn, la plej fierajn, la plej karegajn, tiujn kiuj formas la vizaĝon mem de l'patrujo, kaj kiujn nur miraklo povus

ankoraŭ savi. Ni forgesu unuvorte le plej grandan malfeliĉegon kaj la plej protestindan maljustecon de l'historio por nur pripensi pri la liberigo kiu alproksimiĝas. Ne estas tro frue por ĝin saluti. Ĝi jam estas en ĉiuj pensoj same kiel en ĉiuj koroj. Ĝi estas jam en la aero kiun ni spiras, en ĉiuj okuloj kiuj ridetas al ni, en ĉiuj voĉoj kiuj nin aklamas, en ĉiuj manoj kiuj aletendiĝas al ni skuiĝantaj palmobranĉojn; ĉar estas efektive la admiro de l'tuta mondo kiu nin liberigas.

Morgaŭ ni revenos en niajn hejmojn. Ni ne ploros se ni ilin retrovos ruinigitajn. Ni konos tagojn de heroa malriĉeco; sed ni sciigis ke la malriĉeco ne malĝojigas la animojn kiujn ĉirkaŭas granda amo kaj kiujn nutras nobla penso. Ni revenos fiere, regeneraciitaj en Eŭropon regeneraciitan, rejunitaj de belega malfeliĉo, purigitaj de la venko kaj senigitaj je malnobletaĵoj kiuj nebuligis la virtojn malvigligitajn en ni mem kaj kiujn ni ne konis. Ni estos perdintaj ĉiujn bienojn kiuj pereas, sed kiuj renaskas tiom facile kiom ili pereas. Interŝanĝe ni estos akirintaj tiujn kiuj ne plu mortos en niaj koroj. Niaj okuloj estis fermataj je multe da aferoj, ili estas malfermataj je horizontoj pligrandigitaj. Niaj rigardoj maltimis forlasi niajn riĉaĵojn, nian malgrandan bonstaton, niajn kutimetojn. Ili apartiĝis el la tero kaj nun atingas suprojn kiujn ili ne estis ankoraŭ ekvidintaj. Ni ne konis nin mem, ni ne amis sufiĉe nin unuj la aliajn; ni lernis koni nin en la miro de la gloro kaj nin ami en la doloriga fervoro de la plej granda sin oferado kiun popolo estu iam plenuminta. Ni estis forgesontaj la heroajn virtojn, la tute liberajn pensojn, la eternajn ideojn kiuj regas la homaron. Ne nur ni hodiaŭ scias ke ili estas, sed ni sciigis la universon ke ili ĉiam triumfas, ke nenio malvirtigiĝas tiom daŭre kiam la honorsento estas sendifekta, kiam la amo vivas, kiam la animo ne cedas; kaj ke plej abominindegaj potencoj neniam venkos la idealajn fortojn kiuj estas la feliĉeco, la gloro kaj la nura kaŭzo por ke la homo estu.

MAETERLINCK

Kun la permeso de la aŭtoro tradukis
L. DeMarcy, Leĝoscienca Licenciato
Beauvais, Francujo.

Pesimisto—La plej bona sorto por ia homo estas: ne esti naskita; sed tio al iu malofte okazas!

Ho Ho

Astronomia Profesoro—Ĉu oni iam estas eltrovinta ion sur Venuso?

Studento—Nenion, juĝante per ŝiaj portretoj.

Penna. Punch Bowl, trad. W.H.H.

LA VIRO KUN HAKILO POR AKRIGI

De Benjamin Franklin

Kiam mi estis knabo, mi rememoras ke unu malvarman vintran matenon, alparolis al mi ridetanta viro kun hakilo sur la ŝultro.

“Mia beleta knabo,” diris li, “ĉu via patro havas akrigan ŝtonon?”

“Jes, sinjoro,” diris mi.

“Vi estas bonega vireto,” diris li. “Ĉu vi permesos al mi akrigi la hakilon per ĝi?”

“La komplimento, ‘bonega vireto’ tre plaĉis al mi. “Ho jes, sinjoro,” mi respondis; “ĝi estas en la laborejo.”

“Kaj ĉu vi havigos al mi, mia viro,” diris li, frapetante al mi la kapon; “iom da akvo varmega?”

Kiel do mi povis rifuzi? Mi kuris, kaj baldaŭ alportis al li kaldronon plena da akvo.

“Kiom da jaroj vi havas kaj kio estas via nomo?” daŭris li, ne atendante respondon. “Mi estas certa ke vi estas unu el la plej bonegaj junuloj kiujn mi iam estas vidintaj. Ĉu vi turnos por mi la turnilon dum kelkaj minutoj?”

Ree la flato plaĉis min, kaj kiel malgranda malsaĝulo mi laboradis kaj dolorige mi pentis tiun tagon. Ĝi estis nova hakilo, kaj mi laboris kaj laboradis ĝis lacegiĝo. Oni sonorigis le lernejan sonorilon, sed mi ne povis foriri. Miaj manoj jam vezikiĝis, kaj la hakilo ankoraŭ ne estis sufiĉe akra. Post longa tempo, tamen, ĝi akriĝis, kaj la viro turniĝis al mi, dirante,

“Nu, vi friponetulo! Vi forestu al la lernejo; kuregu, alie vi ĝin pentos!”

“Ho ve!” pensis mi, “estas sufiĉe malbone, tiun ĉi malvarman tagon, turni akrigan ŝtonon, sed nun estas tro multe ke li nomu min friponetulo.”

Tiu okazo eniris profunde en mian cerbon, kaj ofte mi ĝin pripensis. Kiam mi vidas komerciston kiu estas tro gentila al aĉetonto, petante al li trinki brandon dum li jetas la vendadojn sur montratablo, pensas mi: Tiu viro havas hakilon por akrigi.

Kiam mi vidas viron kiu flatas la popolon, kiu deklaras grandan aliĝon al libereco, sed kiu private estas tirano, mi pensas: Atentu, bona popolo! Tiu homo devigus al vi turni akriĝajn ŝtonojn. Kiam mi vidas viron kiun popolamaso altigis en ofcon per partia spirito, viron tute sen kapablo por lin fari respektinda aŭ utila, Ho ve! mi pensas, trompita popolo! Vi estas kondamnita dum kelka tempo turni akrigan ŝtonon.

El la angla tradukis

F. H. Battey.



NOVAJ LIBROJ

La Cindrulino de Aleksandrio, prezo 15 cendoj, trad. J. L. Stanyan. La Usona Esperantistaro ŝuldas multon al nia fervora samideano Stanyan, kiu estas tradukinto, kopio-leganto, kompostisto, presisto, kaj pres-pruv-leganto de ĉi tiu libro. Lia unua alveno en la kampon de eldonistoj klare montras ke ni povos esperi ke estonte al ni ne mankos provizo de malgrandaj, malkaraj libretoj, tiel multenombraj en la Eŭropaj landoj, kaj tiel malmultaj en nia propra lando.

La rakonto mem estas interesplena kaj entute bone tradukita. Pro la deviga multobligo de funkciadoj de la eldonanto estas troveblaj kelkaj preseraroj kaj kelkaj eraroj de gramatiko kaj sintakso kiujn li estus facile eltrovintaj en la verko de alia persono.

Arte kaj mehanike la libreto estus inda je pli granda kaj pli sperta eldonejo kaj kiel la unua provo de nova metiisto ĝi estas mirindaĵo.

La eldono konsistas nur el kelkaj centoj da kopioj, kaj el tiuj nur limigita provizo estas disponebla de la A. E. Co. Kiam la Eldonejo Stanyan'a estos fama, ĝia unua eldonaĵo estos multoble pli valora ol la kelkaj cendoj je kiuj ĝi nun estas acetebila.

Vera Okazintaĵo

Post malgranda familia disputo la patro demandas la 9-jaran Friĉjo:

“Ĉu ne, vi helpas min?”

Friĉjo rigardas malkaŝe unue la patron, poste panjon.

“Nu,” diris panjo, “vi helpas al mi, Friĉjo, ĉu ne?”

Friĉjo (ŝanceligante) post profunda ĝemo: “Mi restas neŭtrala!”

El “Germana Esperantisto.”

Sensenca Amerikano
Ekflugis en aeroplano,
Sed dum li klopodis
La motor' eksplodis.
Trovia estis nur mano.

W.H.H.

THANATOPSIS

de
WILLIAM CULLEN BRYANT

AL tiu, kiu amas la Naturon
 Sufiĉe por komunikiĝi kun ŝi
 En ŝiaj eksterformoj, ŝi parolas
 Diversalingve: por la gajaj horoj
 Ŝi havas voĉon ĝojan kaj rideton
 Kaj elokvantan belon; dum ŝi glitas
 En la malhelajn revojn kun balzamo
 De dolĉa simpatio, kiu baldaŭ
 Plifaciligas ilin. Kiam pensoj
 Pri la maldolĉa fina horo venos
 Inkube al vi en vian spiriton,
 Kaj bildoj nigraj pri la agonio,
 Pri l' mortotuko kaj la ĉerkkovrilo
 Kaj senspireco de l' malvasta tomo
 Tremigos vin ĝis naŭzo de la koro,
 Eliru sub ĉielon la liberan,
 Aŭskulti la instruojn de l' Naturo,
 Car el ĉirkaŭe — el la ter' kaj akvoj
 Kaj profundaj' aera — fluas voĉo:

“Ankoraŭ nur malmultaj tagoj pasos,
 Antaŭ ol vin la ĉiovida suno
 Ne trovos plu en tuta sia kurso;
 Nek en malvarma tero, kien oni
 Kadavron vian palan metis larme,
 Nek en amplekso oceana, estos
 La formo via. Tero, vin nutrita,
 Alprenos vian ŝelon, por refari
 En sian specon; kaj vi mem, perdinte
 Aspekton homan, individuecon,
 Iros miksiĝi kun la elementoj;
 Vi estos frato de l' sensenta roko
 Kaj de la koto, kiun kamparano
 Elplugas kaj surpaŝas. Jen la kverko
 Disradikiĝos tra restaĵoj viaj.

“Sed ne al via lasta ripozejo
 Vi iros sola, — nek povus deziri
 Liton pli grandiozan. Vi kuŝigos
 Kun patriarkoj de l' infana mondo, —
 Kun reĝoj, la potenĉaj de la tero, —
 La saĝaj, bonaj, — kun la belaj formoj
 Kaj viziuloj de la estinteco,
 Ĉiuj en unu ĉerkuĵeg’.- La montoj,
 Rokripaj kaj antikvaj kiel suno;
 La valoj inter ili, revopacaj;
 La praarbaroj; la riveroj, kiuj
 Majeste fluas, kaj la riveretoj,
 Herbejojn verdigantaj; ĉirkaŭ ĉio
 La griza vastegaĵo oceana:

Jen ĉiuj nur solenaj ornamadoj
 De la tombego homa! L' ora suno,
 Planedoj, tuta l' apartenajaro
 De la ĉiel' senfina brilas super
 Malgajaj la loĝejoj de la morto,
 En la silenta daŭro de jarmiloj.
 Ĉiuj paŝantoj sur la tersupraĵo
 Nur malmultego estas en komparo
 Kun la dormantoj en la subteraĵo.
 Per la flugiloj de Mateno pasu
 Trans la dezertosablojn Barkajn, aŭ
 Vin perdu en la seneliraj boskoj,
 Kie ondigas Oregon-rivero,
 Aŭdante nur la sian ondigaĉon, —
 Jen ankaŭ tie loĝas la mortintoj!
 Kaj milionoj en tiuj solejoj
 Depost komenco de la jarpasado
 Kuŝiĝis por la lasta dormo, — tie
 Mortintoj regas solaj! Tiel vi
 Ripozos; kaj ne ĝenu vin, ke eble
 Vi devos en silento vin disigi
 De la vivantoj, — ke amik' nenia
 Vin ploros. Car la tuta spirularo
 Dividos vian sorton. Gajaj ridos
 Post la foriro via, seriozaj
 Zorgplene laborados, ĉiu ajn,
 Kiel antaŭe, ĉasos sian celon
 Fantoman; tamen ĉiuj ĉi forlasos
 Gajadon sian, siajn zorgokupojn
 Kaj venos dormi kun vi. Dum forglitos
 La longa epokaro, la homidojn —
 La junan en printempo de la vivo,
 kaj la plenaĝan en lia floreco,
 Patronon kaj knabinon, kun la dolĉa
 La suĉinfano kaj la grizhara viro —
 Apud vin kuŝigados posteuloj

“Ho, tiel vivu, ke kiam l' alvoko
 Vin igos sekvi la sennombran aron,
 Marŝantan al la pala regno ombra,
 Ke ĉiu prenu sian logolokon
 En la silenta domo de la morto,
 Vi iros ne kiel la minosklavo,
 Skurgate en karceron noktanta, sed,
 Subapogate de fidela fido,
 Aliros vian tombon kiel iu,
 Kiu littukojn ĉirkaŭ sin volvante,
 Kuŝigas sin por ĝui belajn sonĝojn.”

Tradukis Herbert M. Scott,
 Moundsville, W. Va.

LA ELEKTRO ESTAS LA FUNDAMENTO DE LA TUTA KREITARO

Iom de la Historio

La doktrinon de la agado de ŝargita sfero moviĝanta, kaj la kva-zaŭa inerteco de elektra ŝarĝo ekkomencigis Prof. J. J. Thomson per gravega artikolo en la "Philosophical Magazine," aprilo 1881. Tiu artikolo estas unu el la plej rimarkindaj fizikaj disertacioj de la nuna tempo.

Prof. Thomson estis instiginta al tiu studado per la grandiozaj eksperimentoj, precipe de Sir William Crookes, kaj aliaj, faritaj antaŭ la jaro 1879.

En la jaro 1891 Sir William Crookes plue klarigis tiujn eltrova-jojn, kaj liaj eksperimentoj alkondukis al pli bona kono de la elektro, kaj eĉ faras iom komprenebla la elkonsiston de la materio.

Malnova kaj Nova Atomaj Teorioj

Ni volas ekkomenci per la atomo. Ni ĉiuj lernis pri atomoj en la lernejo, tiel ke ni ĉiuj scias kaj komprenas, aŭ imagas scii kaj kom-preni, ke atomo estas la plej malgranda, ne plue dividebla partumo de la materio.

Tamen, Prof. Sir Oliver Lodge diras: "La sola parto de atomo kiun oni ĝis nun povis analizi, estas tiu malgrandeta, sed gravega partumo de ĝia maso, kiu donas al ĝi elektran ŝarĝon, kaj sekve ĥemian interkombinemon kaj radioforton."

Kiel oni rimarkas, laŭ la nova atoma teorio, ni jam dividas la atomon je diversaj partoj.

Elektronoj

Sekvante mi parolos iom multe pri "elektronoj". Atomo de ma-terio kun ĝia ŝarĝo estas "iono"; la ŝarĝon sole konsideratan, sen tia atomo, oni nomas "elektrono." Elektrono tial estas tute senmaterian koncepto. Kiel oni vidas, se ni sekvadas tiun senmaterian studadon pri la elektro, ni eniros la tiel nomitajn okultajn regionojn, kiuj, kom-preneble, ankaŭ estas dedividoj de la Kreita Kosmo, el kiu ĉio elvenas. Tio enkondukos nin en la okultan mondon, pri kiu mi aldonos malmul-tajn vortojn je la fino.

Kiel jam dirite, la sola parto de la atomo, kiu estas ĝis nun ana-lizita, estas ĝia elektra ŝarĝo. Se oni demandas, el kio la cetera parto konsistas, oni nur povas difinite diri, ke tio estas dependa je la naturo de la ĥemia elemento, kiun oni konsideras. Alivorte, kio estas atomo, oni ankoraŭ ne scias.

Sed hipoteze, ni volas esplori la plej simplan atomon, tiun de hidrogeno, kaj ni trovos:

1. La ĉefa parto de atomo povas esti ordinara materio (kio ajn kompreno estu komprenata per tiu kutima, nenion diranta frazo), kunligita kun sufiĉa pozitiva elektra ŝarĝo (kio ajn tio estu) por neŭtraligi la negativajn elektronojn, kiuj sendube ekzistas en ĉiu atomo.

2. Aŭ, la maso de atomo povas konsisti el multego da pozitivaj kaj negativaj elektronoj, kuntenataj per reciproka altireco, aŭ en stato de malsimpla orbita movado, aŭ en iu statika interrilata pozicio.

3. Aŭ la atoma maso povas esti kunmetata de nedividebla unuo de pozitiva elektro, kiu eble estas, por tiel diri, sfera maso de gelatino, en kies centro naĝas samvalora nombro da pintaj elektronoj. Ĉi tiuj elektronoj verŝajne distribuiĝas ringforme, kaj orbite turniĝas ĉirkaŭ la centro per forto alcentra.

Ĉi tiu hipotezo klarigas multajn fenomenojn fizikajn, ekzemple, ĝi komprenigas la vastan kvanton da interatoma energio; ankaŭ la iafojan transŝanĝon de unu elemento je alia. Tamen, ĝi ne ankoraŭ estas tute akceptita teorio.

Alian aspekton de la cetera parto de la atomo oni povus alpreni. Tio estas:

4. Ke ĝi konsistas el ia intertekstajo de pozitiva kaj negativa elektro, formanta kontinuan mason nedivideblan je unuoj, en kies centro apartaj elektronoj movadas laŭ leĝoj jam observitaj pri atomoj.

5. Kvina aspekto de atomo estus, ke ni konsideras ĝin kiel centran "sunon" kun tre densega pozitiva elektro en la centro, kaj multego da negativaj elektronoj ĉirkaŭturniĝantaj ĝin laŭ astronomiaj orbitoj.

Ĉi tiu estas la malplej kontentiga teorio.

Antaŭ ol daŭrigi, ni devas mallonge konstati, ke pozitivaj elektronoj neniam estas apartigitaj, kaj tial, aparte ilin oni ne povis ĝis nun elstudi.

Aliflanke, la negativajn oni funde esploris, oni konas iliajn ecojn kaj movadojn. Por plena klarigo ni nek havas la tempon, nek spacon, nek necesas fari ĝin rilate al la temo jen starigita. Jen ni nur konstatas kelkajn eltrovaĵojn sciencajn. Sajnas tute nature, ke se ni alprenos la teorion pri "negativaj" elektronoj, ni nepre devas akcepti almenaŭ hipotezon pri "pozitivaj."

Tamen, en la aktiva vivo ni ne agas per atomoj "per se," sed per fizikaj korporoj atome kunmetitaj. En la antaŭa parto ni konsideris la atomon de hidrogeno; same rezonante, ni trovos, ke la aliaj tiel nomitaj elementoj ankaŭ konsistas el pozitiva kaj negativa elektro, la sola, sed grava diferenco estas, ke la nombro de la elektronoj, aŭ la kvanto elektra estas malsamnombra aŭ malsamkvanta en la diver-

saj elementoj. (Sajnas al mi, ke ni intencas diri: maĝsamnombra en la sama spaco. Pri tio en la "Resumo.")

Hemia Altireco

Ni nun volas esplori la sekvojn ĝis kiuj oni alvenos, se ni imagas, ke ĉiuj atomoj de la materio konsistas el la samaj fundamentaj unuoj, kaj estas kunmetitaj de sumoj da difinita nombro de diversgrupitaj ŝarĝoj, pozitivaj kaj negativaj. Ke la vera forto de hemia altireco estas la elektro, oni scias de longa tempo. Vera hemia altireco okazas inter du atomoj, kiam ĉiu el ili havas aŭ unu, aŭ pli ol unu ekstran, ne kontraŭvaloran elektronon. Tia atomo havas centralan forton, per kiu ĝi povas sin alligi al aliaj atomoj, kaj formi parojn, aŭ hemian kombinion kun ili. La probableco estas, ke la negativa ŝarĝo estas la plua, kaj ke la pozitiva mankas. Tiel, kiam la parigo okazas, la plua ŝarĝo plenigas la mankan lokon en la alia atomo, kaj tiamaniere kompleta kaj neŭtrala molekulo naskiĝas.

Molekula Altireco

Estas alia, ne hemia kuniĝo, kiun oni nomas "molekula altireco." Ĉi tiu havas lokon inter atomoj, kiuj ne posedas ionan, aŭ kroman ŝarĝon, ĉiu atomo estas tute neŭtrala, kaj konsistas el parigitaj grupoj da elektronoj. Je modera distanco inter parigitaj elektronoj la forto de altireco estas preskaŭ nenio. Sed je malgrandegaj distancoj tiu forto fariĝas grandega. Fine, tiu altireco preskaŭ fariĝas nedistingebla de hemia kombino, escepte, ke la alteniĝo estas malforta alteniĝo ĉe multe da punktoj, anstataŭ fortega alteniĝo sole ĉe unu punkto.

De tiu vidpunkto molekulaĵ fortoj estas elektraj, same kiel hemiaj fortoj; sed ili havas lokon inter hemie saturigitaj molekuloj, kaj estas kaŭzitaĵ de la interagado aŭ malproksima influo unu sur la alian, de parigitaj elektronoj trans molekulaĵ distancoj.

Resumo

Dirite per malmultaj vortoj, la tuta materio estas elkonstruita el molekuloj; el ili konstruiĝas ia ajn fizika korporo; la molekuloj, je ilia vico, konsistas el atomoj, kaj ĉi tiuj estas estigitaj de elektro, pozitiva kaj negativa.

Sir Oliver Lodge diris en sia "Romanes Parolado" en la jaro 1903, paĝo 12: (La antaŭe cititaj diraĵoj estas pli novaj.)

"Ĝi estas ensorĉa la konjekto, ke la elektronoj starigas la fundamenton el kiu la tuta materio estas kunmetita. Imagi, ke 700 elektronoj, 350 pozitivaj kaj 350 negativaj, intertavolitaj kaj interkatenitaj kvaŭzaŭ teksaĵo en stato de perforta movado por produkti konstantan alrilatan pozicion per la influo de decentriga inerteco kaj per siaj elektraj fortoj, starigas atomon de hidrogeno; tio vere estas revo sorĉiga.

“Deksesoble tiu nombro, 11200 da elektronoj, en alia konstanta grupajo, naskas atomon de oksigeno; dek ses mil da ili, 16000, faras atomon da natrio; 100,000, atomon da bario; kaj 160,000, atomon da radiumo.

(Kiu scias la valentecon da la hemiaj elementoj povas por si mem kalkuli la nombron necesan por iu elemento. —La tradukinto.)

“Laŭ jena vidpunkto, la fundamenta ŝtofo aŭ substanco (pro manko de pli bona vorto) el kiu la tuta materio konsistas, estas ĉiam la sama, kaj ne alia ol la elektro, je sumo da egala nombro da pozitivaj kaj negativaj ŝarĝoj elektraj.”

Tiel kaj tial la tuta kreitajaro fundamente estas la elektro en stato de perforta movado aŭ vibrado.

Quod Erat Demonstrandum.

Aldono

Mi nun volas elĉerpi kelkajn vortojn el la nove okazinta parolado de Sir Oliver Lodge ĉe Birmingham, al la anaro de la “Brita Asocio por Promocio de la Scienco.” Ĉe la fino de jena parolado, li diris:

“Homoj kaj Fratoj! Ni estas la zorgantoj de la vero de la Fizika Universo laŭ scienca esploro. Ke ni estu fidelaj al nia zorgaĵo! La radikoj de vera religio estas profundigataj en la homa koro kaj en la realeco de aferoj. Ne estas surprize, ke per niaj metodoj ni ne komprenas. Mi estas unu el tiuj, kiuj pensas, ke la sciencaj metodoj ne estas tiom cellimigataj, kiom oni opiniis. Mi opinias ke sciencaj esplormetodoj povas esti pli larĝe aplikataj, kaj ke oni povas pristudi la psikajn regionojn, kaj leĝe ordigi la eltrovaĵojn. Por pravigi min mem kaj miajn kunlaboristojn, mi devas konstati mian konvinkon, ke okazintaĵojn, kiujn oni nomas “okultaj,” oni povas ekzameni kaj ordigi laŭ sciencaj metodoj. Jam ekzamenitaj faktoj konvinkis min, ke memoro kaj afekcio ne estas tiom ligitaj al la materio, ke sole kun kaj per ĝi ili sin povas elmontrigi ĉi tie kaj nune; ke individueco daŭrigas trans la korpura morto. * * ”

(Plej grandparte elĉerpita el la verkoj de Sir Oliver Lodge)

Tradukis, A. Mayer,
Washington, D. C.

“Kiom da mono Smith ricevas ĉiusemajne?”

“Ho, iafoje lia edzino permesas ke li tenu unu dolaron, kaj aliafoje ŝi donas du al li.”

Tradukis W.H.H.

CLUB DIRECTORY

BERKELEY, CALIF.

Berkeley Esperanto-Rondo, Berkeley H. S.
A. S. Vinzent, Sec'y, 2429a Ellsworth St.,
Meets every Monday, 8.00 P. M.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park
Fr. Kovarik, 2502 S. Kedzie Ave., Sek.
La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island ave.
F-ino R. Votlučka, 1539 W. Jackson Blv. Sek.
Kunvenas Zan kaj 4an sab. ĉiumonate.

CINCINNATI, OHIO.

Cincinnati Esperanto Soc., 629 Vine Street.
A. F. McKinney, Sec. L. B. Harrison Hotel.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo.
F-ino L. B. Weber, Sek., 2036 W. 48th St.

NEW YORK (Bronx) N. Y.

Bronx Esperanto Society, Morris H. S.
C. C. Coigne, Sec'y, 243 Bedford Pk. Blvd.

NEW YORK, (Manhattan) N. Y.

The New York Group, Wash. Irving H. S.,
Jos. Silbérnik, Sec'y, 240 E. 19th St.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg.,
Herbert Harris, Sec'y, 10 Henry St.

ROCKFORD, ILLS.

Skandinava Esperanto-Instituto, 417 7th St.
Joseph Johnson, Sec'y, 2315 Parmelee St.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society
Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

? ? ? ?

In response to our request for an English translation of the Hawaiian words "A hiki i ka hooni aka ana. 6 Eka 6 91-100 Kh huinaha," we have received the following answer:

"The measurements of the surveyor is six acres and six 91-100ths of an acre of the whole."

We are indebted to Mr. Chas. B. Wells of New York City for his trouble in securing this translation for us.

Nova Signalo de Kapitulado

Kiam Germana soldato decidis ke estas necese kapitulacii al Franco, li nek montras blankan flagon, nek fordonas sian glavon. Li sidiĝas kaj deprenas siajn botojn. La Germanoj kutime havas multe pli bonajn piedvestojn ol la Francoj, kaj la Franca soldato nepre devigas interŝanĝon de botoj kiam li havas la bonŝancon kapti Germanon. La Germanoj jam eksciis la fakton kaj multfoje, kompanioj ek trovante ke estas necese kapitulacii, eksidiĝas kaj komencas depreni siajn botojn je la alveno de la Francoj.

Tradukis el "The American Boy"

Iamo.

Vizitanto (malsata)—Kiam vi tagmanĝos?

Terura knabo—Tuj kiam vi foriros.

N. Y. Times, tradukis W. H. H.

Date

A. S. Vinzent, Treasurer,
Tutpacifika Esperanta Kongreso
San Francisco, California.

I the undersigned desire to become a member of the Tutpacifika Esperanta Kongreso and enclose

check
money order
transpagilo

} to cover the following;

....Congress Card (s)@.\$5.00.....\$

....Helpkongresa Card (s) .@.\$2.50.....

\$.for....room (s)@.\$5.00.....

Guarantee Fund \$

Please reserve in my name....room (s) in
private family
hotel at about \$....
apartments

per day, said reservations to begin
(date)

Name
(Mr., Mrs., or Miss)

Address

City State

Iu diris ke nia antaŭa Prezidanto Taft estas unu el la plej ĝentilaj homoj en la mondo.

“Kiel?” demandis amiko.

“Car, kiam mi estas antaŭ ne longe en tramo ĉe Cincinnati antaŭ ol S-ro Taft iĝis la Prezidanto, kelkaj sinjorinoj eniris en la tramon, kaj S-ro Taft donis sian seĝon al tri el ili.”

A. W. Lansing.

ORDER BLANK

The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass.

Please send me at once, to above address, the books, etc., checked below, for which I enclose the sum of \$.....

Name

Address

Year's subscription to the monthly magazine, AMERIKA ESPERANTISTO, \$1.00	
COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), with vocabularies, \$1.25 postpaid	
Combination of one year's subscription to AMERIKA ESPERANTISTO with copy of COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO, \$2.00	

Send me also Complete catalog of Text-books and Literature 10c.

APPLICATION FOR MEMBERSHIP

Fill out this application legibly and mail to Dr. C. H. Fessenden, General Secretary, The Esperanto Association of North America, Newton Centre, Mass.

I hereby apply for membership in The Esperanto Association of North America, and indicate by placing X in the column at the right the extent to which I will be able to cooperate in the work of said Association.

Name

Address

Active Membership, 50 cents enclosed	
Special Membership, \$2.50 enclosed	
Sustaining Membership, \$10.00 enclosed	
I shall be glad to assist in the work of propaganda, and wish you to notify the nearest propaganda leader of the Association	

A C O

THE LATEST ESPERANTO GAME

EVERYBODY'S PLAYING IT!

**Finest Quality Cards. Complete Directions for Playing
50c**

**THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, Inc.
West Newton, Mass.**

JUST SAY

“Send me a Coupon Ticket”

**The easy, practical, economical way to
buy books**

\$5.50 for \$5.00

**The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.**